

ESPERANTO

★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Projektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gill Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 202
27. 7. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo

po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,30 sv. fl. por landoj, kies valuto
sufiĉis maksimume 80% por ĉiuj aliaj
landoj 0,08 dol. aŭ 0,25 sv. fl.

Anonprezo

po kvadrata-centimetro egalvaloro de
0,30 sv. fl. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fl.)
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Antaŭ la Deksesa. Kongresa sentimento.

Ankoraŭ kelkaj tagoj, kaj okazos nia Deksesa. De post kelkaj monatoj oni preparas ĝin. Nek fanfaroj, nek bruo reklamis por ĝi ĝis nun. Tute trankvile la amikoj de Wien verbis individue.

La samideanaro preparas sin por la vojaĝo, kiam ĉi tiu numero de ET estas alvenonta. El ĉiuj partoj ne sole de Eŭropo, sed de la tuta mondo samcelanoj jam aliĝis.

Kongresa sentimento samtempe estas kongres-
espero, ke ankaŭ la ĉi-jara kongreso sukcesu plene. Kial?

Esperanto fariĝis kulturfaktoro, faktoro de potenco. La kongresoj kaj speciale la universala kongreso respektas niajn fortojn kaj povojn. Ili impresu influos la opinion de la publiko pri la perspektivo de niaj sukcesoj en la praktiko.

La kongresoj ĝuigas amuzojn. Prave oni nomis ilin Mondfestoj. Sed ili kaj speciale la Deksesa antaŭ ĉio necesigas ankaŭ seriozan laboron. Grandaj taskoj estas plenumitaj. Novaj problemoj devas esti solvataj. La mondo rapidas, kuntiras nin, postulas faktajn.

Ĉu vi estas pretaj subteni kaj akceli la pluan antaŭmarŝon de nia afero? Ho, jes! Vi devas esti pretaj. Do:

Venu al Wien!

Alportu al la Deksesa ideojn kaj faktojn, entuziasmon kaj realismon, idealismon kaj novan esperon!

Kaj forlasante la belan urbon Wien kunprenu novan kuraĝon por laŭcela agado ĝis la venonta mondkongreso, plia paŝo al la fina celo.

Robert Kreuz.

Al Wien.

Invito

al la II-a Interŝtata Universala Polica Kongreso
Esperantista Wien, 28—31 aŭgusto 1924.

En la pasinta jaro fondiĝis en Nürnberg la „Tutmonda Polica Ligo“ dum la I-a interŝtata universala polickongreso. Malgraŭ la malfacilaj politikaj kaj ekonomiaj rilatoj 9 ŝtatoj estis tie reprezentataj per multnombra kolegaro. De tiam la juna, sed forta, tute senpolitika fakligo disvastiĝis en la mondo. Nuntempe ekzistas sur 4 kontinentoj en 178 urboj ligaj grupoj kaj membroj. La ligo celas ebligi la kunfratigon de la kolegaro policfaka tutmonda por tiel ebligi la nuntempa necesigan unuecan evoluigon de la polico. Samtempe la ligo volas efektivigi diversajn policajn sociajn, ekonomiajn kaj bonfarajn instituciojn kaj aranĝojn. Kiel speciala aranĝo de la ligo kaj ĝiaj kongresoj devas esti nomata la grava fakto, ke la ligo solvis jam la tre malfacilan kaj ĉiam malhelpantan lingvan problemon. Nome, nuntempe ne estas plu eble kaj neniam nacio pli permesus kaj tolerus tion, ke ĝia nacia propra lingvo estu subpremata per aliaj naciaj lingvoj.

Tiu ĉi fakto kaŭzis tion, ke la nuntempaj kongresoj estas preskaŭ ĉiuj senfruktaj kaj neniam oni speritis tiel grandgrade la „Babilonan Turon“ kiel nun. Ĉiu parolas — tute nature — sian propran lingvon kaj la haoso ĉiam pligrandiĝas. La polico estas tiu institucio, kiu bezonas tujan disponeblecon, ĉar ofte de sekundigo dependas la sukceso aŭ malsukceso. La multlingveco grave ĝis nun malhelpis la polican funkciadon ne parolante pri tio, ke homoj, kiuj diverslingve parolas, unu kun la alia neniam povas fariĝi vere kunfratigitaj komprenantoj. La „Tutmonda Polica Ligo“ sukcese propagandas pro tiuj ĉi gravaj kaŭzoj „Esperanton“ kiel oficialan polican interfratilingvon. Jam en la pasinta polickongreso en Wien montrigis la rezultato, ĉar tiu ĉi kongreso oficiale decidis priŝerpi Esperanton.

La provizora programo de la dua interŝtata universala polica kongreso estas jena:

Programo.

1. Salutarolado de A. H. de Marich, ĝenerala direktoro de la Tutmonda Polica Ligo, esinta prezidanto de la unua internacia universala polica kongreso en Nürnberg 1923.

2. Solena malferma parolado de J. Schöber, polica prezidanto de Aŭstrio, ĝenerala prezidanto de la Tutmonda Polica Ligo.

3. Salutaroladoj de la estraroj de la urbo Wien kaj de la ŝtato Aŭstrio.

4. Salutaroladoj de la diverslandaj kaj diversurbaj ligaj delegitoj.

5. Prelego de la protokolo de la unua kongreso (A. Pohle, Dresden, ligo vicdirektoro).

6. Oficiala raporto pri la stato de la ligo. A. H. de Marich.

7. Neceseco de la polica organizaĵo tutmonda: P. Beyer, Platen registara konsilisto, ligo vicprezidanto.

8. Propagandaj aferoj. Sistema organizaĵo de la porliga propagando (grupaj raportoj, gazetservo, kursoj, lokgrupa organizaĵo).

9. Prelegado pri la higiena polico. J. Frenzel (Linz)

10. Prelegado pri la nederlanda polico. K. W. Wijk (Leiden).

11. Prelegado pri la hispana polico. L. Santamarina (Barcelona).

12. Prelegado pri la aŭstra polico. Fr. Hirtz (Wien).

13—15. Eventualaj proponoj kaj referatoj.

16. Elektio de novaj landaj prezidantoj de la ligo kaj de la aliaj funkcianoj.

17. Elektio de la venontjara kongresurbo. Oficialaj invitiloj, voĉdono.

18. Solena fermo de la kongreso.

Sciindaĵoj.

I. Ĉiu ligo membro estas petata traduki ĉi tiun invitilon nacilingve kaj prezenti al la lokaj kaj landaj policfaktoj, al la estraro de la lokaj kaj landaj policaj ligoj kaj al la redakcioj de ĉiuj landaj policfakaj redakcioj.

Oni petu la delegadon de oficialaj reprezentantoj kaj petu la publikigon de ĉi tiu invitilo. Samtempe oni verku gazetscigon pri nia kongreso kaj aperigu ĝin en la plejefikaj ĉiutagaj ĵurnaloj kun la aldono de ĉi tiu rimarko, ke ĉiu, policesiro kaj fakrato, kiu ne ankoraŭ ricevis invitilon, povas ĝin ricevi aŭ de nia centro (aldonu la adreson), aŭ de nia loka membro (aldonu la precizan adreson).

II. Ĉiu dezirante partopreni sin anoncu ĉe nia Wien-a loka kongreskomitato: Fr. Hirtz, polica distriktspektoro, prezidanto de la ligo loka polica grupo, Wien XVIII, Schopenhauerstrasse n-o 60, IV—17 (Aŭstrio).

III. Ĉiu partoprenanto, kiu deziras, povos ricevi senpagan loĝejon kaj malmultekostan nutradon. Vojaĝfavoroj laŭ plipostaj sciigoj.

IV. Pri sciencaj, fakaj kaj amuzigaj aranĝoj, ekskursoj k. t. p. informos decatempe plipostaj sciigoj.

V. Ĉiu helpu laŭpove per nominda sumo per la loka kongresa komitato nian kongreson. Varbu navajn membrojn!

Tutmonda Polica Ligo

Centra oficejo:

Budapeŝt, IX., Ŭllösi-ut 89. IV. 8 (Hungarujo)

Universala Esperantista Pacifista Ligo.

Ni jam povas sciigi la tagordon de niaj „Pacifistaj Kunsidoj“. Ĝi estas jena:

Ĵaŭdo, 7. 8. antaŭtagmeze 8—9³⁰: Libera antaŭinterparolado de la estintaj kaj estontaj UEPLO-estraranoj.

Vendredo, 8. 8. antaŭtagmeze 8—11: Unua Labor-kunsido.

Lundo, 11. 8. posttagmeze 5³⁰—6 h.: La solena Pacifista Manifestacio en grandega koncertsalonego de l' kongresejo.

Mardo, 12. 8. antaŭtagmeze: Dua Labor-kunsido. La programo de la „Pacifista Manifestacio“ estas jena:

1. J. S. Bach, Preludio en Es por orgeno, samideano Karl Mähl.

2. Salutataj kaj raportoj, proponoj kaj decidoj.

3. Definitiva elekto de la Ligo-estraro.

4. Parolado de la protektanto de la filozofia universitat-fakultato Prof. D. Franz Eduard Süss (germane kaj esp.).

Paizo.

5. Deklamacio: „Preĝo sub la verda standardo“ aktoro Philipp von Zeska.

6. Parolado: sinjorino Julia Isbrücker el den Haag.

7. Cefparolado: D-o Edmond Privat, Genève.

8. Esperanto-himno akompanata per orgeno.

La Loka Kongres-Komitato aranĝos la diversajn grandajn fakkunvenojn tiamaniere, ke samtempe kun la granda „Pacifista Manifestacio“ de UEPLO sabato la 9 aŭgusto posttagmeze ne okazos alia granda kunveno. Pro tio la kongresanoj havos la eblon, viziĝi multnombre la gravan „Pacifistan Manifestacion“. Venu do grandamase, por ke ni povu meti dum tiu ĉi kunveno bonan fundamenton por la estonta tutmonda esperantista pacifista movado!

R. M. Frey, Wien.

Liberpensuloj atentul

La 3 julio okazis en Wien ĝenerala kunveno de la liberpensularo de ĉiuj grupoj de Wien. Parolis niaj samideanoj Klabian kaj Gutt. La neesperantistaj gvidantoj de liberpensularo movado ĉefinstruisto Ronzal, famkonata per siaj prelegoj, kaj gvidanto Schulz sin frege favore esprimis al Esperanto.

La liberpensuloj akceptis la inviton por la fak-kunsido de la esperantistaj samcelanoj, kiu okazos la 8 aŭgusto je la 19 horo en Wien VI, Magdalenenstr. n-o 33, salonego de la malsanuleja kazo. Liberpensulo Klabian estis komisiita saluti la eksterlandajn gastojn oficiale je la nomo de la liberpensuloj de Aŭstrio.

Samcelanoj, kiuj havas proponojn, bonvolu ilin tuj komuniki al liberpensulo Paul Gutt, Wien XV, Pelzgasse 12.

Paul Gutt.

Internacia Instruistaro.

La Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (600 membroj) decidis dum sia ĉefkunveno en Platen i. V. la 9 junio 1924:

1. La por ĉiu membro devigan abonon de la pedagogia gazeto „Novaj Tempoj“, kiu laŭ la solenaj deklaroj de siaj fondintoj kaj nunaj redaktoroj estas tute sendependa, neŭtrala organo por decida lerneja progreso.

2. La internacia Esperanto-Konferenco de ĉirkaŭ 500 instruistoj el la tuta mondo, kunveninta dum la XV. Universala Esperanto-Kongreso en Nürnberg 1923, starigis komisionon, kiu intertraktu kun Edukista Internacio en Paris pri organizaĵaj celoj. Ĉar tiuj amikaj intertraktoj ne kondukis kaj pro formalaj kaŭzoj ne povis konduki al rezultato, la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj klopodas, dum la XVI. Universala Esperanto-Kongreso en Wien fondi organizaĵon de Internacia Edukistaro,

kiu havu kiel fakorganon la pedagogian gazeton „Novaj Tempoj“.

La celo de tiu nova unuigo estas lerneja progreso per reformo de instruoj kaj edukado, per plifondigo de la instruista klerigo, per enkonduko de Esperanto en la lernejojn ĉiuspecajn, kiu envolvas pliojektivan scion pri fremdaj landoj kaj popoloj kaj havigas al instruistoj kaj lernantoj ĉiunacian per persona kaj letera interŝanĝo taŭgan fundamenton per reciproka ekkono, estimo kaj ekamo.

Instruistoj de ĉiuj landoj, venu Wien-on kaj helpu nin al nia alta celo, por kies atingo ni interfratigitaj kun ĉiu bonvola samcelanto.

Kiu povas referati pri una punkto el ĉi tiu programo aŭ pri iu ajn pedagogia temo, anoncu tion al la Wien-a sekretario de la Instruista Konferenco, s-o J. Hörl, Wien, Waitzgasse 57 aŭ al la subskribinto.

Arthur Degen,
Leipzig (Germanlando),
Augustenstrasse 15 II. r.

Postkongresa ekskurso al Budapeŝto.

Altiĝoj venis jam el diversaj landoj. Ĉar la aranĝoj dependas de la nombro de anoncantoj, laŭeble anoncu vin jam nun!

Kotizo de sv. fk. 5 estas parte uzota por antaŭluli la menditan loĝejon en Budapeŝto. Se iu loĝas ĉe privatuloj, li pagas nur sv. fk. 3.— por la elspezoj, aliĝkarto kaj presajoj.

Provizora programo. Forvojaĝo el Vien la 14-an matene per ŝipo. Tagvojaĝo sur la Danubo tra bela pejzaĝo. Alveno en Budapeŝto vespere. La 15. 8. kaj 16. 8. rigardo de la urbo. Eventuala programo laŭ nombroj de la gastoj.

La urbo povas doni ĉian komforton de grand-urbo, luksaj hoteloj, banejoj, ekskursoj, amuzejoj, interrilatoj kun ĉiulandaj fervojlinioj.

Pri gvidado estos zorgata!

Prepara komitato de la postkongresa ekskurso. Adr.: Ĉefsekr. D-ro Jozefo Takacs, Budapeŝto, IV., Váci-u. 8. I. 12.

Antaŭkongresa Renkontiĝo en Dresden, la 2-ĝis 4-aŭgusto.

Por la kongresantoj de la Deksesa, kiuj trairas Dresdenon kaj intencas de ĉi tie partopreni la karavanon, aranĝotan de s-o Blankenheim, Berlin, ni donas la eblecon, inter la 2 kaj 4-aŭgusto rigardi la vidindaĵojn de Dresden kaj ĉirkaŭaĵojn kaj viziti la interesejan ekspozicion de Germanaj Tekstaĵoj en Dresden sub sperta gvidado. La programo estas la jena:

Sabaton, la 2-aŭgusto, vespere je la 7a: senĝena kunveno en „Italienisches Dörfchen“ (ĉiela vilaĝeto).

Dimanĉon, la 3-aŭgusto, matene 10 h: rondirado tra la urbo, vizito de muzeoj kaj preĝejoj, ev. posttagmeze rondveturado per aŭtomobilo tra Dresden, renkonte: Brühlische Terrasse, vespere je la 6 h: Granda ĝardeno Carolaschlösschen (Karola kastelo).

Lundon, la 4-aŭgusto, matene je la 10 h: Ekspozicio de Tekstaĵoj, vespere per ŝipo al Blasewitz, ekskurso al Loschwitz-Weisser Hirsche (Blanka cervo), Luisenhof.

La 5-aŭgusto antaŭtagmeze 11.45 h okazos la forveturado al Praha kaj Wien kune kun la karavano laŭ ties voĉgvidano. Por ke lokoj por la en Dresden aliĝintaj povu esti rezervataj, estas necese, ke ĉiu partoprenanto anoncu sin definitive tuj. La kosto por la prizorgo de sidloko en la vagonaro estas unu germana marko kaj devas antaŭe esti pagota al ni. Ni prenas de Dresden nur bileton ĝis Teŝchen por havi en Ĉeĥoslovakio la rabaton por la fervojo.

Do venu Dresdenon! Koran bonvenon!

Por UEA regiono Dresden Por la loka unuigo Dresden
Joh. Karsch Joh. Engst
Dresden A1, Struvestrasse 40.

München.

Tiu, kiu ŝatas:

Tre trinkindan bieron, tre rigardindajn artaĵojn, tre vizitindajn, belegajn urbon kaj ĉirkaŭaĵojn

Nova agadkampo de Esperanto-praktiko.

Jam en frua tempo de Esperanto seriozaj samideanoj rekonsis la necesecon de praktika laboro per Esperanto. Multaj provoj estas faritaj jen kun malgranda, jen kun granda sukceso. Iom post iom ekestiĝis impresa tuto, alloganta la interon de la granda praktiko. Hodiaŭ oni jam povas paroli pri ampleksa Esperanto-praktiko kun specialaj metodoj kaj propraj spertoj. Tiamaniere Esperanto estas ankaŭ enkondukita en la politikon.

La unuan tiaspecan aplikon faris la pacifistoj jam antaŭ la milito per disvastiĝo de propagandiloj pri pacifismo kaj kontraŭ la milito kaj per aperigo de pacifista organo en Esperanto. La uzo de Esperanto en politika sfero aktualiĝis dum la milito. Per helpo de oficialaj rondoj aperis primilitaj broŝuroj kaj bulenoj en Germanujo kaj en Francujo. Post la milito hungaraj defendis sian landon pere de Esperanto kaj poste sovetlandaj esperantistoj tradukis politikan verkon pri Sovetlando. Socialistoj en ĉiuj landoj same eldonis diversajn verkojn pri socialista problemoj.

La aperigo de verkoj politikaj plejparte bazis sur privata iniciato kaj ankaŭ trovis atenton en oficialaj rondoj.

Sajnas, ke nun la intereso de oficialaj rondoj pri Esperanto kaj ĝia uzo por disvastigo de politikaj informoj kaj pritrakto de gravaj problemoj de la politiko pligrandigaĝas.

Antaŭ kelka tempo jam ni informis pri la apero de la verko „Eŭropo ĉe la Abismo“ de la konata itala politikisto Francesco Nitti, iama ministrara prezidento. La aŭtoro de la libro, aperinta en ne malpli ol 25 lingvoj, aplaŭde aprobis la planon de traduko en Esperanto kaj skribis mem specialan antaŭparolon.

Jus aperis kvazaŭ kiel respondo Esperanto-traduko de la libro „La Sendanĝereco de Francujo“ de André Honnorat, senatano kaj eksministro franca. Ankaŭ tiu politikisto skribis apartan antaŭparolon kaj akcentis la gravecon de la uzebleco de Esperanto kiel disvastigilo de politikaj informoj.

Neniel konsiderante la politikan enhavon de ambaŭ libroj ni devas konstati, ke per la aperigo

venu kongresante aŭ kongresinte al München! Kunvenejo dum la tagoj antaŭ- kaj postkongresaj: Hotelo Schoottenhammel, Prielmaiersstr., apud la ĉefstacidomo.

Adresoj por informoj ĉiurilataj:
H. Tressel, del., Parksir. 22 I;
D-o Francke, Lindwurmstr. 145 I.

Vizitu Nürnberg-on!

Ĉar certe multaj samideanoj antaŭ aŭ post la Deksesa trapasos Nürnberg-on, la juvelojn de la germana lando kaj la urbon de la Dekkvina, la nürnbergaj samideanoj estos kun plezuro je dispono de tiuj vizitantoj por prepari la akcepton. Oni sendu kiel eble plej frue sciigojn pri alveno al „Esperanto“ Nürnberg. (Adreso sufiĉas.)

Lingva Komitato.

Elektoj. (79 voĉdonoj; — Plimulto: 40.)

Estas reelektitaj, laŭ IV. 4. 5, 1a de la Regularo, la sekvantaj elirintaj membroj:
S-oj Bünnemann (74 voĉoj), Bulhuis kaj Fischer (71 v.), s-ino Flourens (Roksano) (70), s-o Arnold (69), s-ino Reed (Kellermann) (68), s-oj Rohrbach (67), Reed (66), Bianchini, Degon kaj Underhill (64).

Estas elektitaj, laŭ IV. 4. 5, 2a de l'sama Regularo la sekvantaj novaj membroj:

S-oj Rousseau (76 voĉoj), Kamaryt (75), Obruĉev (74), Baghy (72), Jodko (60).

Akademio.

La elekto en la Akademion por la posteno 11 okazos antaŭ la fino de septembro.

Esperanto en lernejo. Esperanto permesata en polaj lernejoj.

S-o prof. L. Kronenberg turnis sin antaŭ nelonga tempo al Komisa Szkolna Ksiestwa Cieszyn'skiego (komisiono lerneja de lando Teŝeno (Cieszyn) kun peto pri informo koncerne la instruadon de Esperanto. Jen la respondo, kiun li ricevis:

Komisiono Lerneja de lando Cieszyn, n-o 1 491. En afero de Esperanto. Cieszyn, 10 marto 1924.

Al s-o Leopold Kronenberg, prof. de Esperanto en Bydgoszcz.

Respondante vian leteron de 2. k. m. ni sciigas vin, ke ni la aferon de instruado de Esperanto povas trakti nur laŭ la ordono, koncentrantaj la nedevegajn lernobjektojn, kies instruadon oni permesas, se por la lernado anoncos sin konvena nombro da lernantoj kaj se ekzistas instruisto, posedanta laŭleĝajn ekzamenojn. Ni aldonas, ke ni ne intencas fari ian ajn propagadon por ŝanĝi tiun ĉi ordonon.

de tiuj du libroj nova agadkampo de Esperanto estas konkerita. Kiom granda estus la utilo por la homaro, se gravaj politikaj verkoj, informoj, novaĵoj, klarigoj ktp. aperus krom en nacia lingvo ankaŭ en Esperanto! La verkoj ne nepre devas pritrakti certajn disputojn. Povas ankaŭ esti publikigitaj verkoj de informado pri aliaj landoj kaj nacioj, rasoj kaj popoloj. Presitaj en Esperanto la libroj povas disvastiĝi en la tuta mondo. Kaj ju pli kreskas la nombro de personoj sciopovantaj Esperanton, des pli granda fariĝos la perspektivo por tiaj verkoj. Ne sole interesaj de l' ĝenerala vidpunkto, ili ankaŭ helpas, almenaŭ en nuna stato de la afero, al finkonstruo de la praktika lingvo. Tiesence oni devas deziri kiom plej oftan aperon de similaj eldonaĵoj.

Ni publikigas hodiaŭ du recenzojn pri la aluditaj verkoj el Germanujo kaj Francujo kaj cetere kun plezuro akceptos informojn pri simila praktika apliko de Esperanto.

Bibliografio.

Eŭropo ĉe la abismo. De Francesco Nitti, iama ministrara prezidento itala. Selo rajligita eldono en Esperanto. Laŭ komiso de la eldonejo tradukita de Robert Kreuz. Kun speciala antaŭparolo kaj bildo de la aŭtoro. 1924. Havebla pere de ĉiuj libroj aŭ rekte de la eldonejo Frankfurter Sozietätsdruckerei, G. m. b. H., Abteilg. Buchverlag, Frankfurt am Main (Germanujo). 180 pĝ. 14 1/2 x 21 cm. Prezo 3.— ormarkoj.

La grava Nitti-libro en Esperanto! Ĉu io ajn pli trafe pravas la seriozecon de nia movado ol la praktika apliko de nia lingvo? Ĝis antaŭ nelonge la aperigo de esperante verkita aŭ tradukita libroj estis prizorgata de specialaj entreprenoj. Nun eldonejo, kiu estas substiĝita de unu el la plej gravaj komercaj gazetoj de la eŭropa kontinento kaj kiu ekkonas la eminentajn valorojn kaj praktikan utilon de Esperanto, elvenigas ĉi tiun ĉi verkon per konsento de la aŭtoro. — Nitti, la politikisto kaj iama ĉefo de registaro, unu el la aktoroj en la mondodramo, diras en sia antaŭparolo al la Esperanto-traduko, kiu estas farita laŭ la itala originalo, ke li estas speciale kontenta pri la traduko en lingvon, kiu reprezentas unu el la plej grandaj eksperimentoj en la historio de la kulturo. Li esperas, ke ĝi rapide fariĝos la plej granda helpilo por la unuigo de la homaro. — En la grandan nombron de 25 lingvoj la libro estas tradukita, sed ne en ĉiujn, kaj la eldonejo ne eraris, kredante akceli per esperanta eldono la diskonigon de la enhavo per la multe provida helpilino Esperanto, disvastigita en la tuta mondo, ankaŭ en tiuj landoj, en kies nacia lingvo traduko ne povis aperi; kaj la libro rajtas esti ĉie propraĵo. Al la homaro parolas homo, kiu mem gvidis la

Ĉu kaj kioma ŝanĝo okazos, tion ĉi decidos la silezia vojevodajo.

Prezidanto: D-o Ernest Farnik.

Al s-o prof. L. Kronenberg, kiu pro foresto, longtempa kaj multa okupiĝo nur nun povis disponigi al ni la kopion de la grava dokumento por publikigo, ŝuldas ĉiuj s-anoj de Pollando varman dankon pro lia energia kaj sukcesa laboro.

Fr. A. Drenkel,

gvid. de Pola Esp. Servo Bydgoszcz.

Esperanto en lernejo „Pigier“ en Liège.

Post kelkaj interparoladoj kun f-ino Chiquioux, direktorino de la lernejo „Pigier“, la delegio de U. E. A. sukcesis interesi je nia movado la lernejan estrinon, kiu estas ĵus oferinta senpagan ĉambregon. Kurso estas komencita, gvidata de s-o Verbruggen, telegraffunkciisto, kun 20 gelnantoj. Ni devas konsideri tiun rezulton kiel tre gravan.

La plejmulto da gelnantoj de la lernejo Pigier fariĝas, efektive, geoficiistoj en industria kaj komercaj firmaoj; se ili havas kelkfoje okazon uzi Esperanton, ili estas, fakte, bonegaj adeptoj. Plie, se la aliaj instruaj institutoj konstato, ke la kursoj Pigier sukcesas, ili sendube agos sammaniere.

La unua lernejo Pigier por praktika instruado de Komercio kaj kontregistrado, fondita en Francujo de s-o Emile Pigier, estas malfarmita en 1875.

La ideo pri starigo de lernejo, en kiu la gelnantoj ricevas bonan teknikan instruon, per nova metodo, neniel sama kiel tiuj uzataj alioke, estis persona koncepto de s-o Pigier kiu dediĉis sian tutan vivon por efektiviĝi kaj disvastiĝi sian faradon. Post diversaj translokoj kaj aliĝoj, s-o Pigier kreis fine, en Paris'a centro, 19 boulevard Poissonnière, la modelan lernejon de kiu dependas ĉiuj la filioj.

La komerca-oficejo de la lernejo Pigier estas unika en Francujo. Tiel kiel reala komerca firmao, ĝi posedas vitroŝrankojn, fakmeblojn, komercaĵojn, monkasojn, skrib-, kalkul-, stenografim aŝinojn ktp. Laŭvice, la lernantoj estas fakturistoj, sendistoj, kasistoj, kontoregistristoj, korespondistoj, vendistoj, aĉetistoj, stenografistoj, skribmaŝinistoj kaj aliaj. En iliaj manoj estas kontregistraĵoj, komercaĵoj kaj realaj moneroj. Ili efektiviĝas ĉiujn farojn de la komerca vivo kiel ili farus en reala komerca firmao.

La lernejo posedas tre gravan lernejan materialon: 80 gvidlibrojn, ĉiuj presitaj. Iom post iom, paroladoj kun lumbildoj aŭ kinematografio demonstrado okazas. La lecionoj per korespondado, kiu estas inaŭgurita antaŭ pli ol 35 jaroj, havigas bonegajn rezultojn.

Lernejo eldonas monatan revuon „La Ruche“ (La abelujo), kiu estas sendata senpage al ĉiuj la nunaj kaj antaŭaj gelnantoj 35 000 aŭ

sorton de unu el la ŝtatoj de vinkintoj kaj pro sento de respondeco donis al la homaro suferanta sian politikan testamenton. Mi akcentas, ke ankaŭ tiu, kiu ne okupas sin pri politiko aŭ havas alian opinion, devas posedi la libron, ĉar la vastampleksa apliko de Esperanto estas rimarkinda kaj la eldonejo nepre subteninda. Ni akcelu nian movadon per akto de la libro. De la sukceso de tiu ĉi verko en Esperanto dependas la apero de pluraj aliaj diversspecaj verkoj pri politiko kaj pli ampleksa uzo de la helpilino. — Ni vivas komence de la finperiodo, la oficialigo de Esperanto. Multjara serioza kaj senlaca laborado de kuraĝa pioniro atingis la aspiritan celon: la registaro de multaj landoj okupas sin pri nia afero; venkitaj estas hezitemoj kaj kontraŭstaroj. Oficialaj dekretoj enkondukas aŭ rekomendas la Esp.-instruadon. Celo estas atingita, inda je la valoro kaj la graveco de nia movado, spite la krioj de malprogresaj skeptikuloj kaj la subfandono de mondlingvanoj, kies absurda reformemo jam vespere detruas, forĵetas, neas, kion ili matene kreis. Tia procedo taŭgas en scienca laborejo, sed ne por la praktiko, kiu volas kaj sukcese povas utiligi la eltrovaĵojn laŭnature evoluantan kiel lingvo vivanta. Kaj ĉi estas Esperanto! La ideo, kiu entuziasmis la italan politikiston diskonigi la enhavon de sia libro inter la anoj de la Esperanto-movado, estas kvazaŭ ĉiela sanktaĵo, radianta felicigajn lumerojn kaj dissemanta fruktodonajn germojn. — Estu praktikaj, celkonsciaj samideanoj! Nur serioze aplikita laborsistemo disvastigas kaj pligrandigas nian movadon. Ni konvinkas la homaron pri la bona nur per pruvoj de ĝia praktika utiligo kaj apliko. Tia pruvo estas la Nitti-libro, kies prezo estas tre malalta rilate la preskaŭ ducent paĝojn de ĝia enhavo. Bonega estas la traduko de la arte aranĝita volumo. Ni kore danku la tradukinton, nian eminentan pioniron s-on Robert Kreuz, pro lia fero. Ne malpli ni danku la entrepreneman eldonejon pro la granda servo al nia movado. — La samideano estu konscia, ke propagando fiaforma ne malpli efektiva ol paroladoj, knrsoj aŭ gazetartikoloj. Ili grand-nombre uzu la varblon, por ke ankaŭ similaj entreprenoj ekkonu la signifon de nia lingvo. Lasta atako eble montrigis decidiga, kaj neniu malientu la baltkriion direktitan al ĉiuj verdsteloj: La esperantistoj al la fronto! Labori por la bono de mondkulturo kaj batali por la beno de la tuthomaro estas tasko alta kaj nobla. Ĉiu samideano konsideru la aketon de la granda libro sia devo, ne honoro, sed disciplina, kaj li estu konvinkita ĝisvivi la triumfon de nia lingvo — Estas plue necese diri kelkajn vortojn pri la lingvo praktike uzata kaj ĝia valoro, el kies abunde riĉa fonto la tradukinto ĉerpis evitante la malaprobajn kritikon de multaj „neologismemuloj“. S-o Kreuz ne aplikis nove kreitajn radikojn — niinda estas nur „eksoni“ antaŭstataj espritoj (Verax) — kiu estas malpli trafa ol la nova vorto kaj konfuzebla kun ekspozicioj, sed li uzis grandan nombron da internacie konataj fremdvortoj (§ 15) konservante tiamaniere trafe la karakteron de la itala originalo. — Valoro de lingvo kuŝas en tio, ke ĝi plej akurate kaj delikate respegulas ĉiujn nuancojn kaj subtilaĵojn de la originalo, kies tradukon ĝi prezentas. Praktika lingvolaboro, t. e. prilaborado de verkoj, kia estas la Nitti-libro, pravas la plenan uzeblecon de la zamenhofa kreitaĵo kaj montras

40 000. La lasta numero enhavas kiel unuan temon allogan artikolon fuitpaĝan pri Esperanto. La rapida decido farita de f-lino Chinguiou montras la grandan valoron de tiu estrino.

Ni varmege dankas ŝin pro ŝia afabla akcepto kaj ŝia helpo.

Se Esperanto povus esti instruita en la multnombraj filioj kiujn la lernejo Pigier posedas en ĉiuj grandaj urboj de Francujo kaj kolonioj, kiel en Belgio (Liège, Bruxelles, Charleroy), ni ne dubas ke tiu okazintajo estus grava en la historio de nia movado.

E. Oger.

Direktoro de telegraficoj,
57, rue de Campine, Liège.

Esperanto en Portugalujo.

Granda sukceso por Esperanto estas atingita en la portugala kongreso de komercaj kaj industriaj lernejoj. Unuanime estas akceptita rezolucio, kiu pledas por la enkonduko de Esperanto en la komercajn kaj industriajn lernejojn de Portugalujo post konstato pri bonsukcesinta kurso en industria lernejo Fonesca Benevides.

Radio.

Radioparolado en München.

La 25. 7. 24 okazos Esperanto-parolado de la stacio de München de s-o H. Koch pri la temo „La lingvo de l' radio“ (komenco 19,30 h., ondo-longeco 485 m). Aŭskultantoj skribu tuj al la stacio (germanoj germanlingve) piedante por enkonduko de Esperanto en la programon de la stacio. Pruvu, ke Esperanto estas la plej disvastigita kaj sola helpigiva enkondukebla en radio-servon. Adreso: „Deutsche Stunde in Bayern“, Karlstrasse 21, München.

(Bedarinde ni ricevis tro malfrue la informon, por ke ĝi atingu ĉiujn interesatojn. Neniu tamen hezitu skribi al la stacio. Red.)

La duonmonate eliranta gazeto Radio-Rundschau (Radio-Revuo) en Wien, liga organo de la aŭstraj radio-kluboj, komencis publikigi vortaron de la radio-fakesprimoj seslingvan, t. e. en angla, franca, germana, hispana kaj itala lingvoj kaj en Esperanto. La kajero 11. 1924 enhavas nur unupaĝan parton de la vortaro, en la sekvontaj kajeroj oni trovos ĉiam almenaŭ du paĝojn. Komence de aŭgusto, ĵus antaŭ la XVI-a kongreso, aperas aparta kajero en Esperanto-lingvo. Kiu deziras ricevi specimenan kajeron postulu ĝin esperantolingve de la eldonejo: Radio-Rundschau, Wien, I., Burg, Zuckerbäckerstiege.

La radio-vortaro aperos kiel aparta volumo kun korektoj. Ni nepre rekomendas al la samideanoj antaŭmendi la libron.

Rondiranta ekspozicio.

Dankante pro la multaj kaj ofte tre interesaj donacoj ni sciigas al la samideanoj ke ni

daŭrigas la kolektheadon. La objektojn ĝis nun ricevitajn ni jam uzis kiel parton de ekspozicio en Grenaa. Samideanoj, helpu nin krei vere internacian, interesan ekspozicion! La donacoj estos dankeme ricevitaj de Alfred Christensen, Kastanievej 32, Odense.

Nekrologo.

La 15 junio mortis s-o

Ernst Glander,

samideano, el Arnshurg bei Hamburg; antaŭe, kun sia edzino, membro de la hamburga kaj berlina grupoj. Li mortis en la Long-Island hospitalo, Brooklyn, Usono, pro rena malsano. Samideano Glander venis al New York en decembro 1922, kaj tuj poste, kun sia tre estiminda edzino, komencis fari ĉion eblan por nia idealo. Li akiris multajn sincerajn amikojn en New York, kiuj kunigas kun liaj geparencoj kaj geamikoj en Germanujo en korprofunda malĝojo.

Alvoko.

Intencante organizi grandan ekspozicion esperantan en Lodz, ni turnas nin al ĉiumondaj samideanoj kun peto pri alsendado de ĉiuseka ekspozicia materialo, kiun ni laŭdezire resendos. La adreso por la alsendadoj: Lódz, Nowo Cegielniana 7, Polujo. S-o D. Patt.

Komercio.

Foiro de Luxembourg.

